

Kiajn servojn la esperanto-instruado povos alporti al tiu
de la franca lingvo por franclingvaj gelernantoj, 2-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 647, 1976.03.03 & 06

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En sia argumentado favore al la enkonduko de esperanto en la programojn lerneajn la esperantistaro ĝenerale asertas, ke la instruado de la zamenhofa lingvo faciligos tiun de la gepatra lingvo. Sed bedaŭrinde ili ne kapablas diri, kial kaj kiel tio estas ebla. Ilia aserto restas plej ofte speco de slogano.

A.- Dum prelegaro ni provos konkrete demonstri, kiajn servojn la esperanto-instruado povos alporti al tiu de la franca lingvo por franclingvaj gelernantoj.

Cl.- La pasintan semajnon ni raportis, ke la ideala aĝo por komenci la peresperantan instruadon de la franca lingvo estas la naŭa jaraĝo. Kaj ni komencis doni klarigojn pri la instrufazoj. Dum la unua oni lernigas fundamentan radikaron esperantan, kiu respondas al la franclingvaj vortoj, kies ortografion kapablas asimili infanoj de la koncerna aĝo. Nur la aŭd-kaj leg-asimiladon oni ekzercas en esperanto, dum en la franca oni lernigas la ekzaktan transskribon. En la dua fazo oni sisteme kontrolas la ekzaktecon de la franca ortografio helpe de tradukekzercoj el esperanto. En tria fazo komenciĝas ekzercoj, kiuj komprenigas la intervortajn rilatojn, fenomeno okulfrapa en esperanto, sed ne en la franca, kiel atestas la sekva ekzemplo : mana laboro travail manuel ; labora tago jour ouvrable. Ĉiu lernanto antaŭeniras en la laboro laŭ propra ritmo, venontan tradukslipon li ricevas, nur kiam li sukcesis senerare francigi la antaŭajn.

A.- Tiuj ĉi instrufazoj samtempe kaj paralele disvolviĝas. Kun la novaj vortoj oni ĉiam faras kolektivajn ekzercojn pri ilia elparolo kaj francigo. Poste sekvas la individua laboro, kiu estas efektivebla en normalaj klaskondiĉoj aŭ en lingvolaboratorio. Kiam la gelernantoj bone perceptas la rilatojn inter la vortkategorioj substantivaj, verbaj, adjektivaj kaj adverbaj, io nefacila por franclingvaj gelernantoj, tiam oni povas transiri al kvara instrufazo. Helpe de komparoj inter la jam lernita vortmaterialo oni malkovrigas al la gelernantoj la vortformadan rolon de la esperanta afiksaro. Kaj paralele, per la tradukmetodo oni ekzamenas kiel tiu lingva fenomeno esprimiĝas en la franca.

Cl.- Nur la afiksoj aperintaj en la fundamenta radikaro lernota kun sufiĉa ofteco povas esti konsiderataj por tiu ĉi studado. Sin ĉefe trudas pro sia kongrueco kun la infan-psikologio la sufiksoj ino, ido, et-, eg-, -aro, ejo, ujo kaj ilo kaj la prefiko mal-.

A.- Per tiu ĉi instru-fazo komenciĝas la vere originala flanko de la peresperanta instruado de la franclingva vortaro kaj ortografio. Nur konantoj de esperanto povas imagi la riĉecon de la fareblaj ekzercoj.

Cl.- La teorio de la ensembloj aŭ aroj karakterizas la matematikan instruadon. Jen ekzemple vortoj aŭ galicismoj, kiujn la facile komprenebla sufikso aro permesas malkovrigi aŭ instrui en la franca lingvo. En esperanto ni citas nur la ar-vorton, dum en la franca ni listigas la fundamentan kaj la ensemblan vortojn. Vi povos konstati, ke nur dank'al la peresperanta instruado la gelernantoj kapablas rilatigi tiujn ĉi vortoparojn :

A.- Amikaro (ami – ronde d'amis) ; bestaro (animal – faune) ; birdaro (oiseau – gent ailée) ; arbaro (arbre – forêt) ; kamparo (champ – campagne) ; hundaro (chien – meute) ; floraro (fleur – flore) ; horaro (heure – horaire) ; homaro (homme – humanité) ; branĉaro (branche – frondaison) ; foliaro (feuille – feuillage) ; vestaro (habit – garde-robe) ; dentaro (dent – dentition) ; gazetaro (journal – presse) ; ŝafaro (mouton – troupeau de moutons) ; plumaro (plume – plumage) ; ktp.

Cl.- La studado de la vortfamilioj ĉesas esti bazita sur hazardaj ortografiaj rilatoj, kiel ĝenerale estas en la klasikaj lernolibroj, por atentigi la gelernantojn pri la logikaj rilatoj. Ju pli oni antaŭeniras en la studado de esperanto, des pli kompleksigas la tradukekzercoj, kaj, kio estas tute taŭga, la bazo de tiuj ĉi ekzercoj ĉiam estas la fundamentaj radikoj lernotaj. Oni povas diri, ke la filozofio de tiu ĉi metodologio resumiĝas tiel :

A.- Vorto estas vere akirita, ne nur se la franclingva lernanto povas ĝin ekzakte transskribi francen, sed ankaŭ se li kapablas trovi helpe de la esperanta afiksaro, kiun li konas, serion da al ĝi logike ligitaj vortoj aŭ galicismoj.

Cl.- Ni povas esti tute certaj, ke neniuj klasika instrumento bazita nur sur la franca lingvo povos konkurenci la peresperantan metodon, kiam ĝi esprimiĝos per ellaborita lernolibro. Al la verkado de tiu ĉi lernolibro laboras jam de jaroj en Svislando Kultura Centro Esperantista. Bedaŭrinde la monrimedoj ne sufiĉas por permesi rapidan antaŭeniradon.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. La venontan semajnon ni parolos pri la peresperanta instruado de la franclingva konjugacio. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!